

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

Rifuĝintoj kaj forpelitoj (de J. B.). — Inter armena katolika junularo (de W. S.). — Novaĵoj el la rusa komunista junularo (de B. M.). — Ĉefepiskopo Innitzer de Wien (de Walter Mudrak). — Internacia katolika junulara agado. — La Esperanto-movado. — Kunlaboro (aldono al la simbola ludo de Walter Mudrak). — Herder-libroj por Kristnasko. — St. Aloysius-kolekto de la abatejo Schweiklberg (P. Pelegrinus Hoffmann, O. S. B.). — Anoncoj. — Nia movado. — Familiaj informoj. — Katolika Esperanto-literaturo. — Alia rekomendinda Esperanto-literaturo. — Anoncoj.

REDAKCIO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Presejo: Imp. DISONAISE, J. Winandy, Dison. (Beljugo)

Abonprezoj de "La Juna Batalanto"

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpła kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpła kotizo
Anglujo	3 s	4 s	1 s 3 d	Ĥungarujo	3 p	4 p	2 p
Argentino	1,50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	3 s	4 s	1 s 3 d	Japanujo	3 s	4 s	1 s 3 d
Aŭstralio	3 s	4 s	1 s 3 d	Jugoslavujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3,40 s	5 s	2 s	Latvujo	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3,50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilio	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0,50 dol	0,75 d	0,30 d
Ĉeĥoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1,25 fl	2 fl	0,80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4zł	6 zł	3 zł
Danzig	2 g	3 g	1,20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1,20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50 dr	15 dr	Svisujo	2,50 fr	4 fr	1,50 fr
Hispanujo	5 p	8 p	2 p	Usono	0,50 dol	0,80 dol	0,30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevas ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

Postkontoj. Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer); Svisujo : Luzern VII. 2030 (Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug); Belgujo : 3313.51 (Imprimerie Disonaise, M. Jean Winandy).

AĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŝUROJN!

Mondjunularo Katolika, kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto), 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique, 40-paĝa broŝuro en franca lingvo, 2 fr. fr. (0.35 RM).

La Jeunesse Mondiale Catholique, kvarpaĝa varbilo en franca lingvo, 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0.70 RM).

Dans 60 pays, dupaĝa varbilo en franca lingvo, 25 ekz. 1.50 fr. fr. (0.25 RM).

Die katholische Jugend lernt Esperanto. Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo). 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.

Katholiken, lernt Esperanto! La sama varbilo kun alia titolo. Sama prezo.

Die Katholische Weltjugendliga. Moderna informa broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa. 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.

Die Katholische Weltjugendliga. 16 paĝa broŝuro aperinta 1929. Plej bona informilo pri la historio de nia movado. 0.30 RM.

Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung. Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majláth, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekoni la originojn de la MOKA-movado. 0.30 RM.

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63.

RIFUGINTOJ KAJ FORPELITOJ.

La maljusteco de la nuna mondordo kaj la barbareco, kiu regas en kelkaj partoj de la tero, evidentiĝas el la granda nombro de tiuj malfeliĉuloj, kiuj estis devigataj forkuri el sia lando kaj devas nun mizere vivi eksterlande. La rifuĝintoj trovis en la postmilita tempo grandan helpanton en la norvega esploristo kaj homamiko Frithjof Nansen. Laŭ li estas nomita la Internacia Nansen-Oficejo por Rifuĝintoj, kiu laboras sub kontrolo de la Ligo de Nacioj. La raporto de tiu Oficejo por la periodo de la 1 aprilo 1931 ĝis la 30 junio 1932 donas interesajn — kaj pensigajn informojn.

La nombro de tiuj rifuĝintoj, kiuj troviĝis sub la prizorgo de la Oficejo, estas 1.025.185, jes, pli ol unu milionoj! El ili 844.326 estis rusoj, 166.764 armenoj, 14.095 asiroj, asiro-kaldeoj aŭ turkoj. La nombro de laborkapablaj, sed senlaboraj aŭ nur provizore laborantaj rifuĝintoj estis 129.322 rusoj, 19.530 armenoj, 10 asiroj, asiro-kaldeoj aŭ turkoj.

La plej granda nombro da rifuĝintoj restadas en Francujo, nome 400.000 rusoj kaj armenoj. Poste venas Ĥinujo kun 97.386 rusoj kaj Polujo kun 90.000 rusoj. En Polujo la nombro de la senlaboruloj inter ili estas plej granda : 38.000. En Germanujo el 50.000 rusaj rifuĝintoj 30.000 estas senlaboraj.

Kion la Nansen-Oficejo faris, por fondi al la rifuĝintoj novan ekziston kaj novan hejmon? En Sirio pli ol 20.000 armenaj rifuĝintoj estis forkondukataj el malsanigaj tendaroj kaj koloniigataj en kamparaj kolonioj kaj urbaj kvartaloj. En urbaj kolonioj oni loĝigis antaŭ la 1 aprilo 1931 jam 2.381 familiojn kaj post tiu dato 608 familiojn. En vilaĝoj ekloĝis 299 familioj. Krome 4.000 aliaj armenaj rifuĝintoj povis mem trovi eblecon por nova laborado, per la nerekta helpo de la Oficejo. Zorge oni klopodis meti la terkulturajn koloniojn en la najbarecon de aliaj armenaj grupoj aŭ kristanaj loĝantaroj, ekz. kurdoj kaj ĉerkesoj, por ilia sendanĝereco. Nur sanaj regionoj estas elektataj. Oni koloniigis tiel, ke la koloniistoj estu kapablaj gajni siajn vivbezonojn kaj fariĝi post mallonga tempo posedantoj de siaj kampoj kaj domoj, repagante la ricevatajn pruntaĵojn. Individuaj rifuĝintoj grupiĝis laŭ iliaj laborscioj kaj ilia deveno, ĉu el ebenaĵo aŭ el montaro.

El la armenaj rifuĝintoj en Grekujo, kies nombro nun estas 26.000, de post decembro 1931 6.269 transloĝiĝis al la Armena Soveta Respubliko, kie la plej multaj el ili trovis laboron en industrio aŭ komerco. La elekto de tiuj elmigrantoj, kiuj preskaŭ ĉiuj estis senlaboraj, bazis sur propra deziresprimo de la rifuĝintoj. El la 14.398 armenaj rifuĝintoj en Bulgarujo ankaŭ multaj deziris transloĝi al Sovetujo, sed pro diversaj malhelpoj tio estis nebla ĝis nun. La Oficejo esperas, ke estote tiu migrado evoluos, ĉar la Armena Soveta Registaro estas preta akcepti kaj koloniigi en Erivan almenaŭ 20.000 plujajn armenajn rifuĝintojn.

La Dekdua Plenkunveno de la Ligo de Nacioj estis petinta la Oficejon, speciale atenti la malfacilan situacion de pli ol 100.000 rusaj rifuĝintoj en Ĥinujo. Ĉar pli granda agado estis nebla pro manko de mono, la Oficejo nur povis subteni ĉ. 1.000 rifuĝintojn, precipe *katolikojn*, luteranojn kaj menonitojn, kiuj forkuris el Rusujo antaŭ kelkaj monatoj kaj fine atingis la manĉurian ĉefurbon Harbin. Aro da menonitoj estis transportata al Shanghai kaj poste al Marseille, sed pro diversaj malfacilaĵoj ankoraŭ ne estis eble, plenumi la programon de la Oficejo, nome koloniigi ilin proksime al jam ekzistantaj menonitaj kolonioj en Paragvajo. Aliaflanke grupo de 395 luteranaj rifuĝintoj povis ŝipveturi de Shanghai al Brazilio, kie ili fondos kolonion. Tiu fakto montras, ke, kvankam la multnombraj limigoj malebligis transkonduki rifuĝintojn kiel salaĵruloj al enmigraj landoj, tamen ankoraŭ estas bonaj eblecoj por koloniistoj en Sudameriko.

En la printempo de 1932 el Rusujo 2.000 rifuĝintoj transiris la Dnjestro-riveron al Rumanujo, kie jam estis ekloĝintoj 70.000 en la jaro 1930. La rumana registaro koloniigis 581 el ili kaj proponis doni al la Oficejo eblecojn por koloniigi la aliajn ankaŭ en Rumanujo.

La raporto fine tiras la atenton al la kreskiĝanta tendenco de kelkaj registaroj, forpeli rifuĝintojn, kiuj ne posedas vizojn por restado, al najbaraj landoj, kaj esprimas la esperon, ke estonte tio ne plu okazu...

Niaj gelegantoj iom pripensu la situacion de tiuj malfeliĉuloj forpelitaj el siaj landoj pro naciaj, politikaj, religiaj aŭ kontraŭreligiaj kaŭzoj. Ilia nombro estas multe pli granda ol la ciferoj de tiuj, pri kiuj tiel admirinde okupiĝas la Nansen-Oficejo. Se vi venas al Marseille, ne forgesu nepre viziti la mizerajn barakojn, en kiuj loĝaĉas rusoj kaj armenoj ekster la urbo... Kaj rapide vi konvinkigis, ke la junularo ne rajtas toleri, ke la mondo restas tia, kia ĝi estas.

J. B.

Inter Armena Katolika Junularo.

Mi neniam estis en Armenujo aŭ alie en Azio. Sed grandaj partoj de la armena popolo ja estas disigitaj tra la tuta mondo. Milionoj estas forbuĉitaj dum la lasta Mondmilito de fanatikaj turkoj. Nenie ili nun havas veran hejmlandon. Certan kulturen liberecon ili posedas en Soveta Armenujo, sed la religia subpremo tie estas des pli granda. Tiu popolo, kiu malgraŭ ĉiuj persekutoj tra la jarcentoj konservis sian nacian kulturon kaj sian kristanan religion, meritas nian intereson kaj simpatian. La plej granda parto ja ankoraŭ apartenas al la monofizita herezio, sed multaj estas katolikoj. Ili tre amas sian malnovan armenan liturgion, al kiu la plej grandaj poetoj de ilia nacio aldonis poezian ornamon, kaj sian armenan liturgian lingvon. La katolikaj armenoj estas speciale multnombraj en sudorientaj landoj, ili havas ĉefepiskopojn en Turkujo kaj Polujo, episkopon en Rusujo kaj apostolan administranton en Rumanujo. Mi jam antaŭ longe konatiĝis kun kelkaj armenoj en internaciaj kongresoj, kaj pri la situacio de la katolikaj armenoj afabla pastro en la Centro de la Mehitaristoj (armenaj benediktanoj) en Wien estis bone informinta min. Sed la vizito, pri kiu mi volas rakonti, okazis en Rumanujo.

Mi estis tre ĝoja, ricevante en Cluj inviton, viziti ankaŭ la armenan katolikan junulunuigon en Gherla. Gherla estas la centro de la armenoj en Rumanujo kaj nun ankaŭ sidejo de la katolika armena episkopo (li ankoraŭ ne estis tie, kiam okazis mia vizito). Ĝi nomiĝas en hungara lingvo (la armenoj tie parolas hungare) Szamosujvar, germanoj nomas ĝin Armenierstadt (« urbo de armenoj »), kaj ankaŭ la latina nomo estas Armenopolis. Gherla estas krome sidejo de grekrita katolika episkopo, al kiu mi jam antaŭe estis anoncinta mian viziton.

En la stacidomo atendis min la fervora UEA-Delegito Prof. Bela Babos, kaj do kun helpo de Esperantisto mi ne devis timi lingvajn malfacilaĵojn. Cetere mi uzis en Gherla germanan, francan kaj italan kaj ankaŭ miajn malmultajn konojn de hungara kaj rumana lingvoj. Li jam estis aranĝinta ĉion: je la posttagmezo paroladon franclingvan por la rumanoj (kiun speciale rekomendis la episkopo), je la vespero paroladon germanlingvan kun hungara traduko por armenoj kaj hungaroj. Prof. Babos sendis du el siaj studentoj, unu rumanon kaj unu hungaron, tra la urbo kun invitlisto.

Ni promenis tra la urbo. La UEA-Delegito kaj la afabla religia profesoro de la liceo (grekkatolika pastro) akompanis min, kaj je la eniro de la armena preĝejo salutis nin Pastro Bertalan Şahin, gvidanto de la armena katolika junularo. En la preĝejo ni ankaŭ trovis la armenan parohestron de Gherla kaj kelkajn armenajn junulojn. La preĝejo estas granda kaj bela, la plej granda en Gherla, kaj ĝi eĉ posedas kaj fiere konservas bildon pentritan de Rubens, kiun iam donacis al la transilvaniaj armenoj hungara reĝo.

Pastro Şahin kaj la junuloj gvidis min en la junularan hejmon. Ĝi estas granda, belaspekta ĉambro en la armena parohejo. Fiere la junuloj rakontas, kiel ili mem aranĝis ĉion kaj kolektis la tutan meblaron. Ilia unuigo estas aliginta al la Katolika Junmetiista Unuigo, kaj ili estas ĝojaj kaj kontentaj sub la standardo de Kolping. La unuigo enhavas krom armenoj ankaŭ kelkajn hungarojn kaj rumanojn, tamen la karaktero estas tute armena.

Ni babilis pri la situacio de la armenoj en Rumanujo kaj en la mondo. Multaj jam vivas tie depost jarcentoj kaj akceptis kutimojn de siaj gastigaj popoloj. Eĉ la konversacian lingvon. En malnova Rumanujo ili parolas rumane, en Transilvanio hungare, en Bukovino pole. Multaj ankaŭ enmigris en la lastaj jardekoj post la teruraj katastrofoj, kiuj faris ilin senhejmaj en sia propra lando. Kio unuigas la armenojn malgraŭ ilia disigiteco kaj nacia mizero, tio estas ilia kristana kredo kaj ilia fiera tradicio. El la mizero de sia popolo ili ĉiutage preĝas en sia liturgio: «Elaŭdu niajn petojn sanktigatajn per incenso, kiel la oferojn de Habel, Noa kaj Abraham. Per la propeto de viaj superaj batalantaroj konservu neŝanceble la tronon de la Hajkanoj!» — «Gloro Dio kaj ĉiama protektanto, kiu per via Providenco fondis la savon de Armenujo kaj sendis al ni el la peka Parta gento Lumiganton — per lia propeto, ho Savinto, protektu nin nun kaj en la horo de via terura reveno!»

Vespere mi renkontis en la kunvenejo grandan nombron da armenaj junuloj kun pastro Şahin kaj mehitarista pastro. Sciante, ke mi kelkajn semajnojn antaŭe en internacia kongreso en Budapeŝt paroladis pri «la Katolika Eklezio kaj la laboranta junularo», oni estis invitinta min, paroladi pri la sama temo. La plej multaj ĉeestantoj estis junaj metiistoj kaj komercistoj. Mi montris al ili la reĝecon de Kristo kiel granda katolika ideo kaj la mision de la Eklezio al la mondo, mi skizis ankaŭ la taskojn de la junularo, esti la batalantoj por realigo de la reĝeco de Kristo, ankaŭ en la sociaj kaj internaciaj rilatoj. Mi parolis pri la ideoj de MOKA, pri la granda kristana frateco venkanta ĉiujn barojn kaj distancojn. Mi laŭde parolis pri la fideleco de la armena popolo al la kristana kredo, de la fruaj tempoj de Sankta Gregoro Lumiganto kaj Reĝo Trdat ĝis la hodiaŭa tago. Miloj kaj milionoj da armenaj martiroj mortis depost la tempo de la apostoloj, depost la persekuto de Sanatruk en la dua jarcento ĝis la 20-a jarcento, ĝis la dekmiloj da armenoj, kiujn la bandoj de Enver Paŝa kaj Talaat Paŝa buĉis en la Kemah-Valo... Ni devas fariĝi unu popolo de la kristanaro, kies sola reĝo estas Kristo.

Ni longe interparoladis. Ili rakontis al mi siajn pensojn kaj siajn mizerojn kaj sian pretecon al la granda frateco, kiun postulas la kristanismo. Ĉiu nacio havas siajn virtojn kaj malvirtojn, ĉiu nacio havas siajn taskojn. Havante nun la sorton, loĝi inter fremduloj kaj kuri tra ĉiuj landoj, la armenoj devas preni kun si la kredon de siaj patroj... Oni bonvolis donaci al mi belan fotografajon de la membraro de la armena katolika junulunuigo, kaj ĉiu surskribis sur la dorsflankon sian nomon. Tiu bildo restos al mi ĉiama bela memoro. Kiam mi adiaŭis kun «Istén áldya» (Dio benu!)», multaj insistis akompani min...

El ĉiuj popoloj parolas la voĉo de Dio, kaj en ĉiuj lingvoj sonas la evangelio de la amo kaj paco de Kristo. Ĉu ne estas belaj tiuj vortoj de la armena liturgio: «Kristo estas aperinta inter ni. Dio, la Estanto starigis ĉi tie sian tronon. La voĉo de la paco estas soninta. La paco de la sankta saluto estas donita. La malamikeco estas forigita. La paco estas ĉien disvastigita. Antaŭen do, servantoj, levu vian voĉon kaj laŭdu Dion! Benu, Sinjoro!»...

W. S.

NOVAĴOJ EL LA RUSA KOMUNISTA JUNULARO.

Komence de julio 1932 okazis en Moskva la VII-a Kongreso de la Komunista-Leninista Junulara Asocio de la Sovet-Unuigo (Komsomol). La Asocio nun posedas 5 milionojn da membroj en la aĝo de 14 ĝis 18 jaroj, 570 delegitoj kaj 800 gastoj ĉeestis la kongreson. Samtempe la «Ruĝaj Pioniroj» (komunistaj skoltroj), kiuj organizas la infanojn, havas ĉ. 6 milionojn da membroj kaj laboras sub gvidado de la Komsomol, festis sian 10-jaran jubileon.

La politika karaktero de la Asocio montriĝis jam en la devizo skribita en gigantaj literoj super la paroltribuno: « La plej grava afero en la Komsomol-agado estas la certigo de la partigvidado », t. e. de la Stalinismo. La sama karaktero evidentiĝis ankaŭ el la ĉeesto de delegitoj de la militŝiparo kaj de la acarmeo, kies paroladojn la delegitoj aŭskultis starante. En la direktivoj por la junulara agado donitaj de la Centra Komitato de la Komunista Partio en marto 1932 la politika eduko de la juna popolo estas nomita plej nobla tasko de la junulargvidantoj. Pri tiu punkto la revuo « Za komunistiĉeskoje prosvetŝeniĝe » (« por komunista klerigo ») en unu maja numero publikigis detalajn laborprogramojn. Tie estas dirate i. a.: « La grupestro estas unuavice politika organizanto de la junularaj amasoj ». Tamen tiun taskon kontentige plenumas, kiel oni konstatas tute publike, nur tre malmultaj gvidantoj. Entute ekzistas granda manko je gvidantoj. Ekz. en Blankrusujo ekzistas 226 kaj en Azerbajĝano eĉ 567 junulargrupoj, kiuj kunvenas sen gvidanto. El la ekzistantaj gvidantoj 80 % ankoraŭ ne atingis la 18-an vivjaron kaj ne estas sufiĉe kapablaj por la politika tasko. Nova estas la frapanta preteco, doni privilegian pozicion al la gvidantoj en la socialista kadro de la asocioj. Specialan atenton trovis la ideo pri la signifo de la gvidanto en la parolado de la juna ĉefsekretario de la rusa Komsomol, Kosarev, kiu diris, ke « oni devas speciale akceli la gvidantojn de la atakbrigadoj kaj havigi al ili pli bonajn vivkondiĉojn ol al aliaj ». Sed ankaŭ la sukcesoj de la unuopaj membroj devas estis premiaj en speciala maniero, ĉar « neniu devas plendi pri indiferenta sinteno al lia laboro ». Per tio — grava afero — la principo de la egala traktado de gvidantoj kaj gvidatoj kaj de la malantaŭenigo de la individuo rilate al la amasa kolektivo estas forigita. Pli ol ĝis nun oni volas varbi la helpon de la instruistaro. Oni eĉ postulas, ke por la instruistalajroj la kunlaboro en la komunista junularo estu konsiderata. Sensaĝe oni akcentas la necescon de la « industria-teknika eduko », kaj ekzistas homoj, kiuj kredas, ke jam en la periodo de la dua Kvinjarplano la principo « vivi kulture, labori racie » estos realigata. Kosarev diris: « La junaj homoj de la 19-a jarcento estis homoj vere « superfluaj », kiuj vivis sen klara konscio. Al tio kondukis ilin la kapitalismo, kiu al ĉiuj demandoj nur sciis la respondon: Iru en monaĥejon! Sed nia respondo estas: Antaŭen, en la batalon, venku la malfacilaĵojn, disigu la kontraŭulojn! El tiuj kelkaj citaĵoj oni ekkonas la senliman fierencon pri la propra forto, kiu montriĝis en la Komsomol-Kongreso. La Sovet-Unuiĝo, la « patrolando de ĉiuj socialistoj », por ili estas « la plej forta, la unua lando de la mondo »...
B. M.

Ĉefepiskopo Innitzer de Vieno.

Ondon de ĝojo rezultigis inter la katolika popolo de Vieno kaj tuta Aŭstrujo la sciigo — farita la 20 septembro 1932 de la papa nuncio ĉefepiskopo D-ro Sibilija al la nuna liga kanceliero D-ro Dollfuss —, ke la Sankta Patro elektis Universitatan Profesoron D-ron Theodor Innitzer ĉefepiskopo de Vieno. La esprimoj de ĝojo, simpatio kaj gratulo tute ne venis nur de oficialaj katolikaj rondoj, sed montriĝis ankaŭ ekster ili, en gazetaro, publika vivo kaj ĉie en urbo kaj lando.

Ĉefepiskopo D-ro Innitzer naskiĝis 1875 en Weipert (germana regiono en Bohemujo), vizitadis la gimnazion en Kaaden (samregione) kaj studis teologion en Vieno. 1902 li sacerdotiĝis, 1906 li fariĝis doktoro en teologio, 1913 orda univ. profesoro. Granda estas lia scienca kaj religia aktiveco, i. a. li okupiĝis pri la sanktaj lokoj en Palestino kaj gvidis kelkajn vojaĝojn tien, modestega lia persona vivo, grandega kaj multkonata lia afableco, helpemo kaj subtenemo scenescepte al ĉiuj, kiuj venas al li. Trifoje li estis dekanato de la teologia fakultato en Vieno, 1928/29 li estis rektoro. Estu precipe menciata, ke li en tiu funkcio energie gardis dignon kaj justecon sur universitata tereno kontraŭ la malindaj atakoj kaj perfortmetodoj praktikitaj de la nacie ŝovinista kaj « ras-ameca » parto de la studentaro. Sinceran amikecon li havis al la mortinta univ. prof. kaj ekskanceliero D-ro Seipel. En la jaroj 1929/30 li okupis en la eksterpartia faka ministraro gvidita de D-ro Schober la postenon de ministro por socialaj aferoj.

En la tago de sia solena ĉefepiskopa konsakro (la 16 oktobro 1932) li direktis sian unuan episkopan ĉirkuleron al la eparkianaro. Lia devizo « In caritate servire » (en amo servi al ĉiuj) li alvokas la popolon al praktika amo al proksimumoj, kiu estas des pli necese, ju pli peza estas la tempo de krizo kaj mizero. Kaj al ĉiuj, ankaŭ al la eksteruloj nekredantaj, li sin turnas. Samsence li ordonis, ke la kutima festeno post la episkopiga soleno ne okazu kaj la mono ŝparita estu donata al la karita ligo. Kaj en multaj aliaj okazoj li en sia modesta, senceremonia, sed des pli insista maniero petis la kunlaboron de ĉiuj por amo kaj paco: « Servanta amo, jen nia sankta devo! »

Por la katolikaj Esperantistoj estas ĝojiga fakto, ke la nuna ĉefpaŝtisto de Vieno, postulo de la fervora akcelanto de Esperanto, mortinta kardinalo Piffi, jam antaŭ sia episkopiĝo (interesigita de samideanoj Reg.-Kons. Steiner kaj Frey) dokumentis sian ŝaton kaj simpatian al Esperanto. 1931 li vizitis la Internacian Esperanto-Muzeon, tinjare li obligis al Pastro Cseh, fari paroladon pri Esperanto en la grava katolika-scienciga Leo-Societo, kies ĝenerala sekretario li longjare estis. Ankaŭ en la finfesto de la Cseh-metodaj kursoj de Gesinjoroj Morariu la samideanaro povis lin ĝoje saluti. La 2 oktobro okaze de inaŭguro de alpreĝeja ŝtuparkonstruaĵo en Maria-Gugging, ĉarna pilgrimejo en la Viena Arbaro, ĉeestis samideanoj, esprimante specialan saluton. La ĉefepiskopo respondante dankis kaj finis per la vortoj « Hoch Esperanto! » (Vivu Esperanto!).

Ne nur la Viena kaj aŭstra, sed la tutmonda katolika Esperantistaro, precipe Mondjunularo Katolika, gratulas kaj sindoneme salutas Ĉefepiskopon D-ron Innitzer. Kaj liaj valoraj rekono kaj takso de Esperanto estas nova instigo, malgraŭ terure efikanta krizo, per ĉiuj fortoj labori por kaj per Esperanto, por « servi en amo » al Dio kaj al la homoj.

Walter MUDRAK, Wien.

Internacia Katolika Junulara Agado.

Pax Romana. Al la tro mallonga raporto en nia septembra numero ni aldonas kelkajn detalojn pri la decidoj de la kongreso de Bordeaux-Lourdes. Oni volas organizi en la venonta jaro 4 internaciajn studsemajnojn: 1. en Krakow (Polujo) por poloj kaj germanoj pri la « kristana ŝtatkoncepto », 2. en Heiligenkreuz apud Vieno (Aŭstrujo) pri « la bazoj de la internacia kunlaboro », 3. en germanlingva Svisujo pri « la katolikaj studentoj kaj la internacia vivo », 4. en Belgujo, se eble, pri temo ankoraŭ sciigota. La studentinoj havas laborsemajnon en la paska semajno en Germanujo. Pri profesiaj aferoj oni ankaŭ volas okupiĝi. Provizore oni faros provon pri la medicina fako. La sekvonta kongreso okazos en Luxembourg.

La Internacia Sekretariejo de la Katolika Universitata Gazetaro en Lille (S. I. P. U. C.), kiu laboras en la kadro de Pax Romana, komencis sian agadon per publikigo de detala raportlibro pri la kongreso de Lille kaj per publikigo de unua numero (25-paĝa) de sia informservo francalingva. 1933 oni volas eldoni ĝin regule dumonate en tri lingvoj (franca, angla, germana). Ĝi enhavas elĉerpajojn kaj mallongajn priskribojn de la enhavo de katolikaj studentaj gazetoj diverslandaj. S. I. P. U. C. jam havas korespondsekretariojn en multaj landoj, ankaŭ ekster Eŭropo. Unu el la gvidantoj, Duplex, faris vojaĝon tra Eŭropo, por veni en personan kontakton kun universitataj asocioj. Ĉu SIPUC sukcesos realigi sian vastan programon? La junaj pioniroj bezonas multe da kuraĝo kaj persisto por tio. Nia simpatio akompanas ilin. — Cetere ni menciis el la raportlibro, ke la gazetoj de la katolika universitata junularo nun havas 243.000 abonantojn en Eŭropo, 8.000 en Azio, 12.000 en Oceanio kaj en Ameriko same multajn aŭ eĉ pli ol en Eŭropo...

Ibero-Amerikana Federacio de Katolikaj Studentoj estas en preparo. Jam en la lasta vintro okazis konferenco en Meksiko, en kiu la katolikaj studentoj de 15 landoj metis la bazon por intima kunlaborado. La sekretariejo troviĝas en Mexico, kaj la definitiva fondo okazos en granda kongreso, kiu baldaŭ okazos en Lima (Peruo).

Internacia Konferenco de Katolikaj Politikaj Junularaj Grupoj okazos 5-6 decembro 1932 en Bruxelles. Kelkaj gvidantoj de MOKA partoprenos. En la unua tago oni aŭskultos raportojn el la diversaj landoj, kaj en la dua tago oni diskutos pri ebla daŭra internacia kunlaboro kaj starigo de komuna minimuma programo. Nia amiko Raymond De Becker, ĉefsekretario de la belga Centrale Politique de Jeunesse, kiu preparas la konferencon, redaktis interesan demandaron senditan al la diversaj asocioj. Oni demandas ilin pri doktrino, agado kaj organizo, speciale pri la ideoj pri ŝtato, parlamento, kapitalismo, nacio, Ligo de Nacioj, sinteno al faŝismo, komunismo, rasismo, socialismo, liberalismo. Adreso de la Centrale Politique de Jeunesse : 23, rue du Marais, Bruxelles, Belgujo.

La Esperanto-Movado.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I. K. U. E.) okazigis sian nunjaran kongreson en la pilgrima urbo Lourdes, 7-11 aŭgusto 1932. Aliĝis 100 kongresanoj, efektive ĉestis 86 el 13 landoj, nome Anglujo, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Danzigo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Irlando, Italujo, Nederlando, Norvegujo, Svisujo, Tuniso. La pilgrimo komenĉiĝis en Paris post la Universala Esperanto-Kongreso. Oni haltis en Toulouse kaj faris viziton al la vizitindaĵoj de tiu urbo. Pastro Font-Giralt, prezidanto de IKUE, celebris sanktan meson. En Lourdes okazis diversaj kunvenoj, en la ĝenerala kunveno de IKUE nur 2 landaj ligoj (Nederlando kaj Belgujo) estis oficiale reprezentitaj. Oni mallonge diskutis pri la jarraporto de la ĝenerala sekretario, pri la « serva organizado » kaj pri la organizo de katolikaj blinduloj Esperantistaj. Okazis ekskursoj al Betharram kaj Galvarnio kaj unu vesperon « Floraj Ludoj », literatura konkurso laŭ kataluna kutimo. Komprenoble la kongresanoj regule partoprenis la Sakramentan Procesion kaj Krucvojon en Lourdes. La episkopo de Lourdes, Msgr. Gerlier, akceptis ilin kaj elparolis vortojn de simpatio. La kongreso ankaŭ ricevis leteron de Kardinalo Verdier, ĉefepiskopo de Paris, kiu bonvolis akcepti la patronecon de IKUE. Je la tombo de Pastro Emile Peltier, pioniro de la katolika Esperanto-movado kaj fondinto de la gazeto « Espero Katolika », oni metis florojn. En la groto de la Plejsankta Virgulino Pastro Font-Giralt faris predikon en Esperanto.

En la Universala Esperanto-Kongreso en Paris predikis en la katedralo Notre-Dame Pastro Profesoro Dr-ro Franz Christanell el Salzburg (Aŭstrujo).

Esperanto-Kongreso en Köln. Oni atendas almenaŭ 2.000 kongresanojn. Köln ja estas vere modela urbo por granda kongreso. Ĝis nun jam aliĝis 103 personoj el 15 landoj. Ĝis 31 decembro valoras favora prezo por aliĝoj de 18.— RM, poste oni pagos 20.— RM. Adreso de la Loka Kongresa Komitato (L. K. K.) : Köln, Trajanstr. 25. Komprenoble la Eldonejo La Juna Batalanto ĝojus, se multaj gelegantoj venus al Köln okaze de la Kongreso. Ni organizos por ili specialan amikan kunvenon.

La episkopo de Danzig, Grafo O' Rourke, estas honora prezidanto de la nove fondita Katolika Esperanto-Grupo en Danzig. Li persone ĉestis la fondokunvenon kaj faris salutparoladon.

Esperanto en la Skolta Mondjamboreo en Budapeŝt 1932. Necesa estas nun speciala propagando en skoltaj rondoj, por ke la venonta jamboreo signifu bonan progreson por Esperanto. La Hungara Skolta Asocio estas favora kaj oficiale rekonis Skoltan Esperantistan Ligon. Kiu volas helpi, skribu pri informoj kaj bultenoj al Hungara Skolta Esperanto-Rondo, Budapeŝt V., Nagy Sandor-u. 6, aŭ al Skolta Esperantista Ligo, N. Booth, Nethertherton, Huddersfield, Anglujo.

En Hungarujo nun ekzistas (en Debrecen) la unua Esperantista skoltrupo, t. e. tuta trupo lernis kaj uzas Esperanton... — Apud Gödöllő okazis (15-29 julio) Esperantista Skolta Tendaro. — En oficiala hungara skoltgazeto aperis la sekvanta frazo : « Ĉinĵ, kiuj ne havas okazon kaj eblecon, lerni ian fremdan lingvon, faras bone, se ili lernas almenaŭ Esperanton kaj uzas ĝin ». Bone!

Katolikaj skoltoj en Belgujo interesiĝas pri Esperanto. La flandra federacio jam de longe akceptis specialan insignon por Esperanto-interpretantoj. Oni klopodas, ke la valona federacio faru same. La katolika skolta asocio havas Esperanto-sekretariejon.

En Ĉeĥoslovakujo la Ministro por Komercio kaj Industrio donis al la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio por la jaro 1932 subvencion de 5.000 kronoj por Turisma propagando en eksterlando.

La Sovetlanda Esperantista Unuiĝo havas 6.000 membrojn kaj budĝeton de 96.000 rubloj (1932).

En la I-a Mondkongreso de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) en Berlin okazis akcidento : Polico venis en la kongresejon, kaj 12 eksterlandaj Esperantistoj estis arestataj, ĉar ili ne havis pasportojn kun si. Ili devis resti 5 horojn en policejo, kelkaj eĉ kelkajn tagojn. — La sekvonta kongreso okazos en Moskva.

Socialistaj kaj komunistaj Esperantistoj nun ofte okazigas limkunvenojn kun partoprenantoj el diversaj landoj. En kunveno en Heerlen (Nederlando) ekz. ĉestis pli ol 300 Esperantistoj el Nederlando, Germanujo kaj Belgujo. En Düren simila kunveno intencas kunigi 500. Katolikaj Esperantistoj devus agi same!

KUNLABORO.

En la simbola ludo de Walter Mudrak publikigita en la septembra numero de J. B. erare forrestis kelkaj versoj. Bonvolu do aldoni al la teksto en paĝo 35 (maldekstre meze) jenan dialogparton, ni ankoraŭ ripetas la unuajn tri versojn. De la teatraĵeto aperis aparta eldono sur bona blanka papero, komprenoble kun la plena teksto. Prezo : 0.10 RM; 5 ekz. 0.40 RM.

Esperanto :

Jen mia origina celo.

Simbolas ĝin la verda stelo,

(montras al la stelo).

Ĝi lumu do en kunvenoj

De pacagemaj gekolegoj,

Ke ne plu pro la multlingveco

Malfaciliĝu unueco.

Ĉar frato fraton ne komprenas,

Malgraŭ ke oni multe penas

Per tradukadoj kaj ripetoj

De l' paroladoj kaj enketoj.

Paco :

Ho, fakte, kion vi asertis.

Mi kun bedaŭro ofte spertis.

Esperanto :

Nur sur komuna lingva bazo

Vi venos al finvenka fazo!

Sindone tion mi akcentas.

Paco :

Mi konvinkite nun konsentas.

Esperanto :

Ne mem homaron mi pacigas,

Militon el la mond' forigas.

Por vi de supertera brilo

Mi estas nur la taŭga ilo,

Ĉar lingvo, la por ĉiuj sama,

Facila, por celad' homama.

Paco :

Modesta estas via diro.

Esperanto :

Laŭ de la Majstro nur deziro.

Paco :

Sed tamen altsignifoplena,

Korege estu do bonvena,

Helpante min en la batalo.

Paco kaj Esperanto :

Por la komuna idealo!

(kune malrapide foriras.)

Herder-Libroj por Kristnasko.

Elekianta donacojn por parencoj kaj geamikoj okaze de la Kristnaska festo, oni estos ŝparema en ĉi tiu jaro. Tamen la misero de la tempo ne devus instigi nin. Ŝpari je la malĝusta loko. Pli ol iam ni bezonas en ĉi tiuj tagoj fortikan spiriton kaj religian bazon, vastan, klaran rigardon, kaj ankaŭ veran kaj profundan ĝojon. Cion ĉi donas bonaj libroj. Volonte ni rekomendas al niaj germanlingvaj gelegantoj la nove aperintajn verkojn el la Eldonejo Herder. La prezoj, kiujn ni indikas, valoras por tolbinditaj ekzempleroj.

Por niaj junaj laboristoj estas vivgvidilo *Hans Mümmeler, Jugend an der Maschine* (Junularo ĉe la maŝino, 4.40 RM). Pri religio, profesio, pureco, familio kaj multaj vivproblemoj ĝi babilas, restante ĉiam tute proksime ĉe la ĉiutaga vivo en la industrio. *Wilhelm Mathiessen, Der Turm der alten Mutter* (La turo de la maljuna patrino, 5.20 RM) kolektis en moderna formo la belajn malnovajn labelojn. Gigantoj kaj malgraudeguloj, reĝoj kaj vilaĝanoj. Dio kaj diablo, studento kaj metiisto kaj la multaj aliaj tipoj de la germana fabelo promenas facilpaŝe en nian tempon kaj instruas ridante kaj plorante profundan saĝecon. La *Libro de la Germana Sorto de Theodor Seidenfaden* (Deutsches Schicksalsbuch, 1-a parto: Das Reich, 7.50 RM) estas trafa kombino de historio kaj legendo kaj montras al la junularo la germanan animon en la spegulo de la historio, kun ĝiaj virttoj kaj malvirttoj, kun beno kaj danĝeroj. Bela rakonto de aventuroj estas *Peter Dörfler, Die Abenteuer des Peter Farde* (4.60 RM).

Por infanoj *W. Mathiessen* verkis ĉarman libron de fabeloj: *Das alte Haus* (3.10 RM), ĉe por tute malgrandaj infanoj ĝi taŭgas, kaj plenkreskulojn ĝi ne enuos, se ili havas komprenon por la saĝeco de la fabelo. Kaj ankaŭ pri bela enkonduko en la bibliajn historion ni devas atentigi: Se oni posedas *Dr. Elly Reininger, Geschichten aus der Bibel für die ganz Kleinen* (kart. 1.40 RM), oni povas facile klarigi la vivon de Jesuo al kvar- aŭ kvinjaraj infanoj. Gepatroj, pliaĝaj gefratoj ktp. certe ŝatos ĝin, kaj ankaŭ instruistoj kaj pastroj ricevos el la libro bonajn ideojn por sia instruado en la unuaj klasoj de la lernejo.

Grupoj kaj gvidantoj de la junularo devas posedi *Wilhelm Peuler S. J., Jugend spricht im Chor* (Junularo parolas en horo, kart. 2.60 RM), kiu estas la unua riĉa kolekto de parolhoroj por la katolika junularo. Inter la 70 poeziaĵoj troviĝas kelkaj, kiuj estas vere bonegaj, aliaj plaĉas malpli. Sed tian kritikon oni ja devas elparoli pri ĉiu kolekto de tiaj verkoj. La libro estis necesa, kaj ni deziras al ĝi sukceson.

Fine ni ankoraŭ atentigu pri la grandaj enciklopedioj de la Eldonejo Herder. La Politika Enciklopedio (Staatslexikon) kaj la Pedagogia Enciklopedio (Lexikon der Pädagogik der Gegenwart) ĵus fariĝis kompletaj. De la 10-voluma Enciklopedio por Teologio kaj Eklezio (Lexikon für Theologie und Kirche) aperis la 4-a volumo. Kaj la granda ĉefenciklopedio *Der Grosse Herder* aldonis al siaj unuaj 3 volumoj la grandan *Mondan kaj Ekonomian Atlason* (Welt- und Wirtschafts atlas, duonlembind. 42.50 RM), kiu estas admirinde klara kaj fidinda verko. Ĝi estu trece rekomendata!

St. Aloysius-Kolekto de la Abatejo Schweiklberg.

En nia monaĥejo Schweiklberg (benediktana abatejo en Malsupra Bavarujo) troviĝas rimarkinde granda Aloizio-kolekto enhavanta biografiojn, preĝarojn, artikolojn el legend- kaj medilibroj, revuoj kaj almanakoj, Aloizio-predikojn, kantojn, muzikaĵojn, poemojn, teatraĵojn kaj fotografiojn, sciigojn pri la beno de Aloizio- kaj junulardimanĉoj, pri plenumoj de preĝoj, raportojn pri speciala honorado en religiaj kunularoj, frataroj, paroĥoj, familioj kaj unuigoj, notojn pri Aloizio-festoj kaj inaŭguroj de standardoj. Troviĝas en la kolekto ankaŭ multe da desegnaĵoj de la kara sanktulo, precipe ŝildoj sur papero, drapo, tolo, pergamento, kaj medalionoj, standardoj kaj statuoj.

Ĉiu, kiu posedas aŭ konas tiajn objektojn, al ni plenumus grandan servon, kompleze sciigante aŭ priskribante ilin. En kelkaj familioj tiaj bildetoj kuŝas en malnovaj libroj aŭ en tirkestoj malmulte atentite kaj ŝatite; kelkaj el ili estas en

danĝero, esti malkare fordonataj kaj detruataj okaze de mortoj, kaj multaj rimarkindaj okazintaĵoj, kie St. Aloysius estis helpinta, por ĉiam estas forgesataj, ĉar neniu notis ilin.

Ni tre kore petas, sendi tiajn notojn kaj objektojn al la suba adreso, ĉe se la objektoj estas trece eluzitaj, malpurigitaj aŭ difektitaj, aŭ se la notoj estas tre mallertaj, stenografitaj aŭ trece mallongaj. Ĉio ajn koncernanta Aloizion estas en la kolekto afablege ŝatata kaj praktike uzata por la plua disvastigado de la graciĉa Aloizio-honorado.

La nomoj de tiuj, kiuj sciigas aŭ sendas al ni tiajn objektojn k. t. p., estos enskribataj danke en albumo, kiu estas konservata ĉi tie ĉe relikvoj de l' St. Aloizio. La sankta junulo tre sukcesplene petu por ĉiuj tie enskribitaj!

Patro Pelegrino Hoffmann O. S. B., Monaĥejo
Schweiklberg apud Vilshofen, Malsupra Bavarujo,
Germ.

ANONCETOJ.

Anoncetoj, speciale pri korespondado, kostas 0.50 RM. ĝis 20 vortoj.

Litovujo. Mi volas korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun legantoj de La Juna Batalanto. V. Rakauskas, Videniškiu p. ag. Varniškaiai.

Kun katolikaj rusoj deziras korespondi en Esperanto, rusa, franca, germana, holanda, angla, itala aŭ latina lingvo A. de Caluwé, Via C. Cattaneo 2, Roma, Italujo.

Katolika studento germana deziras korespondadi en Esperanto kun junuloj el ĉiuj landoj. Anton Ghab, Kiliancum, Miltenberg a. M., Germ.

Aŭstra samideano, instruisto, deziras Esperantan, francan, anglan kaj italan korespondadon kun geamikoj el la tuta mondo. Ernst Moik, Knittelfeld, Kärntnerstr. 24, Aŭstrujo.

Kun in alilandulo, kiu amas historion, literaturon, ĝenerale la librojn, korespondas J. Schülze, Burladingen (Hohenzollern), Wasen 37, Germ.

Maloftaĵo interesaga estas a libro de Prelato Dombrowski « Malgrandaj Pensoj pri Grandaj Demandoj » publikigita 1908. 216-paĝa libro por 1.50 RM. Eldonejo La Juna Batalanto.

Belgoj! Mi volas korespondi kun anoj de K. A. J. Mi estas gvidanto de grupo de K. J. V. Ankaŭ aliaj personoj el la junulara movado estas petataj, skribi al mi, precipe « Sokol » -anoj. Adreso: C. Loonen, Delegito de MOKA, OOSTERHOUT, Hollando.

Haus Lindenhof, Jugenheim bei Darmstadt, Germanujo, ŝatata aerkuraĉloko, dieto, frukto- kaj fruktsukokuracoj, gvidado tra centrajn urbojn kaj centragermanajn regionojn, instruado pri germana lingvo al eksterlandanoj, granda biblioteko en la domo, naĝbanejo apud la domo, arbaroj, montoj; teatroj kaj muzeoj en proksima Darmstadt (ĉiuhora aŭtobuso).

Kantaro Katolika enhavanta sur 80 paĝoj 40 kantojn kun muziknotoj, kolektitaj kaj eldonitaj de Leopold Chiba, nepre necesa por ĉiuj katolikaj Esperantistoj. Prezo 0.90 RM. (1.50 ŝil., 1.20 sv. fr.). Aldonu 10 % por sendkostoj! Mendu en Aŭstrujo ĉe la aŭtoro (S-ro L. Chiba, Wien IV., Schaumburggasse 5), en aliaj landoj ĉe la Eldonejo La Juna Batalanto.

Favora propono, speciale por senlaboruloj: Ni posedas pli grandan kvanton de jenaj Esperanto-lerniloj por germanlingvanoj. Ili estas eldonitaj antaŭ la milito kaj iom polvumitaj. Ni vendas ilin malmultekoste: *Irmscher, Wörterbuch Deutsch-Esperanto*, 164 paĝoj, 0.50 RM.; *Die Weltsprache Esperanto*, praktisches Lehrbuch (Miniatur-Bibliothek), 168 paĝoj, 0.40 RM. Eldonejo La Juna Batalanto.

Nia Movado.

Internacia Oficejo.

La ĉefsekretario de MOKA faros en la sekvonta jaro vojaĝojn al Usono kaj Kanado, al Litovujo, Latvujo kaj Polujo, al Rumanujo kaj Jugoslavujo en la servo de diversaj organizaĵoj. Kun la helpo de amikoj ĉiulandaj li esperas utiligi tiujn vojaĝojn por nia movado.

Eldonejo La Juna Batalanto.

Nia Libreja Fako rekomendas sin por liverado de ĉiuspeca Esperanto-literaturo. Bonvolu uzi ĝiajn servojn, ĉar la profiton el tio ni bezonas por La Juna Batalanto. Speciale por Kristnasko mendu viajn Esperantolibrojn ĉe ni!

Aŭstrujo.

Wien. Novaj Esperanto-kursoj estas en preparo en la Katolika Krucligo, kie agadas nia MOKA-sekretario W. Mudrak, kaj por katolikaj skoltroj (Korpuso de Sankta Georgo), kie klopodas nia amiko Jakob. — Nia nacia sekr. partoprenis en la 29-a Internacia Mondpaekongreso en Wien. Por Esperanto tie propagandis kelkaj samideanoj, Registara Konsilisto Steiner (prez. de la Esperanto-Muzeo) salutis la kongreson oficiale. La konfuzo pro la tradukoj en kelkajn lingvojn estis granda. Kiam oni definitive akceptos Esperanton? En kunveno de la Pacligo de Aŭstraj Katolikoj paroladis Pastro Prof. Hoffmann (Breslau), en kunveno de militservrifuzantoj nederlanda protestanta pastro Hugenholz kaj germana generalo v. Schoenaich. — W. Mudrak publikigis en Neue Zeitung, ĵurnalo de la katolika laborista movado, tradukon de artikolo « La Sanga Internacio » el J. B. kaj artikolon « Gemeinschaftsgeist-Gemeinschaftssprache », kiu bone propagandis por Esperanto kun atentigo pri MOKA kaj LA JUNA BATALANTO.

La nova ĉefepiskopo de Wien D-ro Innitzer akceptis Esperantistan delegitaron sub gvido de Reg.-Kons. Steiner. Li eniris la Honoran Komitaton de la Esperanto-Muzeo kaj diris, ke estas lia deziro, ke la katolika movado pli atentu Esperanton.

Indohinujo.

Saigon (Tonkin). Nia abonanto Guérineau informas nin, ke en decembro okazos internacia foiro, en kiu la Esperantista Grupo de Saigon fondita antaŭ 2 monatoj havos standon kaj ankaŭ ekspozicios la eldonaĵojn de La Juna Batalanto.

Luksemburgo.

Nia delegito A. Frantz propagandas kaj klopodas publikigi artikolojn pri MOKA en katolikaj gazetoj.

Usono.

La internacia sekretario restos kredeble 6 semajnonjn en Usono. Li faros sian unuan paroladon la 29 januaro 1933 en Chicago, restos du semajnonjn en la ĉefaj urboj de la Middle West (Meza Okcidento) kaj iros poste al la Oriento (New York ktp.) por paroladoj.

FAMILIAJ INFORMOJ.

Pastrigo. Nia kara amiko kaj MOKA-ano D-ro Walter Klemann en Roma ricevis en la Festo de Kristo-Reĝo (30 oktobro 1932) la sakramenton de la sankta pastra konsakro en la Collegium Germanicum-Hungaricum. La unuan sanktan meson li celebris en la Festo de Ĉiuj Sanktuloj en la Baziliko Santa Maria Maggiore. Nome de la MOKA-ano tutmonda ni esprimas al li tutkorajn gratulojn. Ni estas certaj, ke li en la sankta ofero ne forgesas nin.

Honoro. P. Francisko Meštan en Krems (Aŭstrujo), membro de la Esperantista Lingva Komitato, eksprezidanto de IKUE, honorprezidanto de KUE, estis distingata per la argenta honorsigno de la aŭstra respubliko.

Morto. Mortis nia abonanto Pastro P. Fischer en Schwarzenfeld, Germanujo. R. I. P.

Katolika Esperanto-Literaturo.

(Fino)

<i>L. Milho, Cindrulino</i> , sama kolekto, 24 pĝ., 6 bildoj	0.15 RM.
<i>Fratino Teresa, Du Horojn en Timego</i> , legolibro por katolikaj infanoj, bonega arango, 32 pĝ.	0.85 RM.
<i>Franjo Modrijan, Fabeloj</i> , originale verkitaĵoj de slovena aŭtoro, 32 pĝ.	0.40 RM.
<i>M. Saunders, Bela Joe</i> , aŭtobiografio de hundo, luksa eldono, 312 pĝ. 7 artaj ekstertekstaj ilustraĵoj kaj multaj bildoj entekstaj.	bind. 4.00 RM.
12. Diversaĵoj.	
<i>Hanns Sappl, Kiel oni fondas kaj organizas Esperantan Grupon?</i> 2a eldono, grava kaj utila helpilo, 32 pĝ.	0.20 RM.
<i>Walter Mudrak, Kunlaboro</i> , Simbola Ludor pri Paco kaj Esperanto, Vivrenovigo kaj Junularo,	0.10 RM.
	5 ekz. 0.30 RM.
<i>Litova Almanako</i> , kolekto de interesaj artikoloj pri literaturo, penso kaj vivo de la malgranda litova popolo, enhavanta ankaŭ kelkajn artikolojn de Prelato Dombrovski, 288 pĝ.	1.50 RM.
<i>Prof. Prelato A. Dombrovski, Pri unu speco de kurbaĵaj linioj</i> koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton, grava matematika verketo originale verkita en Esperanto, 24 pĝ.	0.30 RM.
<i>Prof. Prelato A. Dombrovski, Pri novaj trigonometriaj sistemoj</i> , 36 pĝ.	0.75 RM.
<i>Walter Mudrak, Kunlaboro</i> , Simbola ludo pri Paco kaj Esperanto, Vivrenovigo kaj Junularo, 4 p.	0.10 RM.
<i>LA JUNA BATALANTO</i> , Organo de la Internacia Katolika Junularo kaj Paca Movado, eldonata de Mondjunularo Katolika (MOKA), dumonata gazeto, kuranta jarkolekto	2.00 RM.
jarkolekto 1931/32	1.50 RM.
6 malsamaj numeroj el la jaroj 1926-1931	1.50 RM.
<i>MONDJUNULARO KATOLIKA (MOKA)</i> , 4 paĝa flugfolio kun informoj pri ĉelo, labormaniero, organizo kaj historio de MOKA, po 10 ekz.	0.20 RM.

Alia Rekomendinda Esperanto-Literaturo.

1. Verkoj de D-ro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto.

<i>Fundamento de Esperanto</i> , eldono kvinlingva (franca, angla, germana, pola, rusa), 196 pĝ.	1.20 RM.
<i>Fundamento de Esperanto</i> , eldono franca, flandra-holanda, greka, hungara, itala, rumana, turka, armena, judhispana, po	0.60 RM.
<i>Fundamenta Krestomatio</i> , eksterordinare riĉa kolekto de interesaj artikoloj el literaturo, poezio, scienco de ĉiuj landoj kaj originalaj verkoj en Esperanto, 472 pĝ.	3.00 RM.
<i>Lingvaj Respondoj</i> , gravaj por pliperfektigo en Esperanto, 92 pĝ.	1.20 RM.
<i>Proverbaro Esperanta</i> , enhavas la tradukon de 1232 proverboj el ĉiuj lingvoj, 96 pĝ.	1.50 RM.
<i>Fabeloj de Andersen</i> , 3 partoj, ĉiu 1.80, ĉiuj tri kune (464 pĝ.)	5.40 RM.
<i>Georgo Dandin de Molière</i> , 60 pĝ.	0.80 RM.
<i>Hamleto de Shakespeare</i> , 172 pĝ.	1.20 RM.
<i>Ifigenio en Taurido de Goethe</i> , 108 pĝ.	1.50 RM.
<i>La Batalo de FVivo de Dickens</i> , 88 pĝ.	2.00 RM.
<i>La Rabeno de Baharah de Heine kaj La Gimnazio de S. Alehem</i> , 72 pĝ.	1.00 RM.
<i>La Rabistoj de Schiller</i> , 144 pĝ.	1.80 RM.
<i>La Revizoro de Gogol</i> , 104 pĝ.	1.50 RM.
<i>Marta de Orzesko</i> , 240 pĝ.	3.00 RM.
<i>Esperanto-Paroladoj</i> , kun germana traduko de D-ro Pfeiffer, 176 pĝ.	1.20 RM.
<i>Originala Verkaro de Zamenhof</i> , prizorgita de Prof. Dietterle, 605 pĝ., lukse tolbind.	10.00 RM.

2. Modernaj verkoj originalaj kaj tradukitaj.

Erich Maria Remarque, *En Okcidento Nenio Nova*, la famkonata libro en Esperanto-traduko. Libro kontraŭ la milito! 252 pĝ.

broŝ. 4.50 RM.
bind. 6.30 RM.

Erich Maria Remarque, *La Vojo Returnen*. Ankaŭ la dua verko de Remarque aperis en Esperanto.

broŝ. 5.00 RM.
bind. 7.00 RM.

Jean Forge, *Saltego trans Jarmiloj*, 192 pĝ., bind.

2.75 RM.

Stephan Zweig, *La okuloj de la eterna frato*,

1.20 RM.

Sten Bergman, *Tra sovaĝa Kamĉatka*, belega libro pri tiu malproksima lando kun multaj bildoj kaj landkarto, 276 pĝ.,

broŝ. 4.50 RM.
bind. 6.00 RM.

LIVERKONDIĈOJ :

Ni ankaŭ liveras ĉiujn aliajn Esperanto-librojn je originalaj prezoj. Pri alia rekomenda Esperanto-literaturo kaj pri nacilingvaj lerniloj ni eldonas specialajn prezarojn.

Ni nur liveras librojn kontraŭ *antaŭa pago*. Uzu la poŝtkontojn de LA JUNA BATALANTO! Ni akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, Internaciajn Respondkuponojn de la poŝto kaj UEA-kuponojn.

Por sendkostoj aldonu 10 % de la sumo. Liveraĵoj de pli ol 10.— RM el Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo kaj Litovujo, de pli ol 20.— RM. el aliaj landoj estas farataj sen fakturigo de sendkostoj.

ELDONEJO LA JUNA BATALANTO, D-ro Wilhelm Solzbacher, Köln-Dellbrück,
Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

Soeben erschien in der Reihe der
Kölner Sozialpolitischen Studien

Wilhelm Solzbacher

WALTHER RATHENAU ALS SOZIALPHILOSOPH

Die Ueberwindung der Entseelung

150 Seiten.

Die Mörderkugel eines verhetzten Nationalisten, die am 24. Juni 1922 der deutschen Republik ihren Aussenminister raubte, machte Walther Rathenau zu einem Märtyrer der Politik. Und doch war er nur gezwungen in die Politik gegangen. Die Grundidee all seines Schaffens war die Ueberwindung der Entseelung. Dieser Grundidee geht der Verfasser nach und stellt dann Rathenaus geniale Gedanken zum Neubau der Wirtschaft und Gesellschaft hinein in die Strömungen der Gegenwart. Für alle, die sich in der gegenwärtigen Notzeit mit der Frage einer neuen Ordnung befassen, wird dieses Buch von grossem Wert sein.

Ladenpreis 3.50 RM, Leser des Juna Batalanto erhalten, wenn sie vor dem 15. Dezember bei uns bestellen, das Buch zum Vorzugspreis von 2.30 RM.

Verlag La Juna Batalanto, Köln-Dellbrück.

DER GROSSE HERDER
12 Bände
u. 1 Welt- und
Wirtschaftsatlas

Wissen der Gegenwart
Fürs praktische
Leben
Rat und Führung
Für Geist und
Seele

Auskunft beim Buchhändler
oder bei Herder, Freiburg i.B.

**HERDERS
WELTUND
WIRTSCHAFTSATLAS**

Mit dem Statistikband
**DIE WELT
IN MASS
UND ZAHL**
Inhalt: 22.500
PROJEKTIONEN BEIM BUCHHÄNDLER

20 Führer der Jugend aus 17 Ländern

schufen auf Anregung des Schweizerischen Katholischen Jungmannschafts-Verbandes das umfassende Sammelwerk

JUVENTUS CATHOLICA

Die katholischen Jugendverbände Europas.

Das Buch enthält auch eine ausführliche Darstellung der Katholischen Weltjugendliga, mehrere Freunde der MOKA und des JUNA BATALANTO haben mitgearbeitet. Das Vorwort schrieb der Bischof von Basel.

Jeder Freund der internationalen katholischen Jugendarbeit muss dieses einzigartige Programm- und Nachschlagebuch besitzen!
Vorzügliche Ausstattung, Umfang 212 Seiten. Preis 2.40 RM.
Bestellt beim Verlag La Juna Batalanto!

DIE KATHOLISCHE WELTJUGENDLIGA von Dr. Wilhelm Solzbacher,

Soeben erschien diese kleine, aber wirksame Aufklärungsschrift auf sehr gutem Papier und in vorzüglicher Aufmachung. Jeder Leser des JUNA BATALANTO muss sie besitzen und verbreiten.
Preis 15 Pfg, 5 Stück 50 Pfg.
12 Seiten

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger
Marktweg 63.

Voulez-vous être au courant du mouvement démocratique et pacifiste, particulièrement parmi les catholiques français?

Cherchez vous une revue de pensée, de doctrine et d'action?

Lisez

L'AUBE NOUVELLE

Revue de pensée et d'action démocratique,
publiée par le SILLON CATHOLIQUE.

Voir dans le dernier numéro les résultats de

L'ENQUETE SUR LA QUESTION INTERNATIONALE

La Loi d'Amour. — La S. D. N. et le Droit naturel. — L'Organisation de la Paix. — La Sécurité. — Le Désarmement. — L'objection de conscience.

Réponses de : Dr Solzbacher, Félix Hintz, Dr ing. Jaroschek. Weltjugendliga, Dr Julius Levin, Kurt Grossmann, Hans Wichmann, Paul Chan-son, Georges Hoog, Joseph Folliet, A. D. Tolédano etc...

Le Numéro : 3 Francs.

Abonnement : un an 10 Francs.

« Le Sillon Catholique », 31, Rue de Bellechasse, Paris.

Le Sillon Catholique publie également un journal mensuel :

L'AME POPULAIRE.

Spécimen gratuit sur demande. Abonnement : un an 5 Francs.

Der Friedenskämpfer

Monatszeitschrift des Friedensbundes Deutscher Katholiken, steht im 8. Jahrgang.

Der Friedenskämpfer bedeutet :

Stellungnahme zu den Fragen des Friedens, zu den Ereignissen der Aussen- und Wehrpolitik;
Berichte über die Friedensbewegung des In- und Auslandes;
Kampf gegen den Krieg und für den wahren Frieden auf Grundlage der Kundgebungen der Päpste und der deutschen Bischöfe;
Klärung und Verbreitung der katholischen Kriegs- und Friedenslehre;
Arbeit für die Abrüstung :
für die deutsch-französische,
für die deutsch-polnische Verständigung;

« Der Friedenskämpfer » wird den Mitgliedern des Friedensbundes Deutscher Katholiken gegen Jahresbeitrag von RM. 4,80,— zugesandt und kann von Nichtmitgliedern zum Jahrespreis von RM. 3,60,— durch die Post oder durch den Verlag bezogen werden.

Wer « Den Friedenskämpfer » nicht halten kann, aber durch seine Mitgliedschaft die katholische Friedensbewegung unterstützen will, erhält für einen Jahresbeitrag von RM. 1,20,— die Vierteljahrszeitschrift « Der Friedenskämpfer » B.

Verlangen Sie in Probenummer « Der Friedenskämpfer » gratis oder ein Postabonnement zum Vorzugspreis von RM. 0.50 für das Vierteljahr. Voreinsendung an den

Friedensbund Deutscher Katholiken E. V.
Zentralbüro Frankfurt/Main, Liebfrauenberg 37.